

Nikolaus Lenau,
La postiljono

tradukita de Manfred Retzlaff

Ĉarma estis nokt' de Maj',
nuboj de arĝento
flugis ĉe l' ĉielo kaj²
blovis varma vento.

Ekdorminte kuŝis nun
voj' kaj strato ĉiu;
noktogardis nur la lun'
kaj krom ĝi neniu.

Kaj trankvile tra l' kampar'
iris la aero,
kie dormis la idar'
de la primavero.

Nur la rivereto sen
bruo fluis tie,
kaj odoris floroj jen,
sonĝe idilie.

Postiljono krudis pli,
vipon li knaligis,
lian kornon laŭte li
tra la val' sonigis.

...

²aŭ: flugis surĉiele kaj

Sonis de l' ĉevaloj kvar,
dum la veturado,
tra floranta la kampar'
gaja huffrapado.

Preterflugis la pejzaĝ',
kiam ni rapidis,
ke la pacon de l' vilaĝ'
mi apenau vidis.

Preterrapidante mi
vidis che preĝejo,
ke en maj-feliĉo ĉi
kushis jen tombejo.

Staris alte super ni,
ĉe dekliva vojo,
pala kruco-bild' de Di',
mute en malĝojo.

Kaj la postiljon' malpli
gaja nun fariĝis,
la ĉevalojn igis li
halti kaj mutiĝis.

„Halti devas tie ĉi
ja ĉeval' kaj rado;
ĉar jen kuŝas“, diris li,
„mia kamarado.

...

Estas tre domaĝe, ke
kuŝas li entere.
Estis li ja kara tre,
ho sinjoro, vere!

Devas halti ĉiam mi
en ĉi tiu loko,
lin saluti tie ĉi
frate per korn-voko!“

Gajan kanton sendis li
per la korn-blovado,
por ke trapenetru ĝi
al la kamarado.

Kvazaŭ respondado de
jena kamarado
sonis de la monto re
lia korn-blovado. -

Lante pluveturis ni,
kaj blovado lia,
longe postsonoris ghi
en orelo mia.

*Traduko de la Germana poemo “Der Postillon” de NIKOLAUS LENAŬ (*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984.*

MR154-2 / Arg-625-1264 (2014-08-27 13:27:24)